

Korajni salutoj!



ENHAVO

julio - 1999 - N° 22-a
ASTURIO

- 2....Nia Regiono
- 3....La ursino de Curniana
- 4....Daltonismo
- 5....Ĥimero
- 6....La Sumicio
- 7....Bezono de la Internacia
Lingvo tra la Historio
- 8....Laŭdo pri la frenezo
- 9....Mesagoj
- 10..La bona Fratineto
- 11..Regnu Unueco en
Diverseco
- 12..Rakontetoj pri ovoj
- 13..La jetbuloj
- 14..Siamaj katoj
- 15..Amuzajoj
- 16..Sepa Esp-Semajno



**REVUO DE LA AVILESA
ESPERANTO - GRUPO**



NIA REGIONO

(ASTURIAS)

Estraro de ANTAŬEN

Prezidanto: Nicolás Muñiz

Sekretariino : M^a Luisa
Menéndez

Kasisto : Luis González
Bibliotekisto: César García

Desegnisto: Císimo Rabanedo

Gekomitatanoj:
M^o José Álvarez Faedo

David Menéndez
Eva González
Gene Álvarez
Lisa Ejarque
M^a Isabel Murillo
Daise Murillo

Nia adreso:

Casa Municipal de Cultura
33400 AVILÉS
(Asturias)

Tfn^o. 98. 554 11 27

Subvenciita per la Registaro
de la
Avilesa Municipo

Depósito legal n^o As. 1398 (9)

La unua estis miksita kompozicio de pentraĵo kaj skulptaĵo aktuale oni konservas la belegajn kapojn el ŝtono. La Apostolado surformas la fustojn de la ses paroj da kolonoj. En la presbitero, la du krucoj; tiu de la Anĝeloj kaj tiu de la Venko; tiu de Alfonso II kaj tiu de Alfonso III. Mem tiu kiu malfermas la kortegon en Oviedo kaj tiu kiu fermas ĝin. Unu ĝusta jarcento inter ili jaroj 808-908. La kritika analizo malfaris la legendon kiu ĉirkauiris la realigon el tiu de la Anĝeloj al ili ĝi estas atribuita kaj kune kun ili enviciĝas inter la blazonŝildo de la urbo. Tiu de la Venko, ora ujo por tiu el la kverka de la reĝo Pelayo, estis la blazono de Alfonso III, hodiaŭ ĝi estas ununura motivo de la provinca blazonŝildo. Ankaŭ estas en la Sankta Ĉambro la relivkesto, kiu estante el cedra ligno, kovris el arĝento kun bareliefoj Alfonso VI, je la jaro 1075. Kaj la kesto el la agataj donita de Fruela II je la jaro 910, kiu montras francan plakon je la VII jarcento

La Redakcio.-

LA URSINO DE CURNIANA*

De multaj estas sciata la legendo de la roma lupino kiu mamnutris la supozitajn fondintojn de Roma, Romulo kaj Remo. Ni ofte trovas similajn rakontojn plenaj el bestoj, pli aŭ malpli fabelaj, kiuj per siaj agadoj favoris al la homoj.

En Asturio, en la vilaĝo nomata Curniana, la vojaĝanto gapas ankoraŭ kiam, levinte sian kapon antaŭ la lokan monahejon, siaj okuloj stumblas kun reliefa stona ornamento kiu reprezentas ursinon mamnutrante infaninon.

Oni diras ke la menciitan monahejon bebino ankoraŭ, en tiuj malsukcese

dum pluraj tagoj ĝis kusejo de ursino mamnutris. Post princino edzigis al la reĝo, ŝi ordonis monahejo ke ili tiamuloj kaj eksterordinara



princino Christina, fondinte la en la jaro 1020, perdis sin, montoj, kaj ŝin serĉadis samfamilianoj kaj servistoj finfine ŝin oni trovis en kiu, anstataŭ difekti ŝin, ŝin iom da tempo, kiam la Ordonius Radimiriz, filo de al la konstruistoj de la surstonigu, por la kono de venontoj, la bildon de tiel fakto.

Nuntempe, lupoj kaj ursoj, samkiel multaj aliaj sovagaj bestoj, estas en danĝero je ekstermo. La homoj baldaŭ forgesas ĉion bonan de ili atingita. Tute certe malantaŭ ĉi tiuj legendoj trovigas vero ; kontraŭe, kial ni trovas similajn rakontojn el la diversaj popoloj logantaj sur la Tero ?

Konsidere al tio antaŭe montrita kaj al la malfavora batalo kiun ĉi tiuj bestoj alfrontigas kiam konkuras kun la homaj pafiloj mi antaŭsentas time la proksiman tagon kiam la plej junaj, vizitante Curniana-on, vidos en la bildo de la ursino imagon de mitologia estaĵo neekzistanta, io maltrovebla kvazaŭ dragono.

* Prononcu Kurnjana

Maria Teresa Gutierrez
(LERNANTINO)

Daltonismo

Oni diras ke, iu angla fizikisto desegnis paŝtejon kaj li pentis la herbon de ruĝa koloro. Iuj da personoj atentigis al li ke, la ruĝa koloro, estis la koloro de la sango. Tiam li respondis: ĉu ne estas same?


Tiu-ĉi fizikisto nomiĝis Jhon Dalton; kaj li naskiĝis en la urbo de Eaglesfield-Cumberland. je la 5-a septembro 1766

Li estis profesoro el naturhistorio kaj matematikoj. Li eltrovis gravajn leĝojn pri la dilatado el la fluidoj kaj la miksikado el la gasoj. Ankaŭ li definis la nocion el la molekulo plie la molekula pezo. Li mem, kune kun multe da personoj, perceptis pri la koloroj el determinaj floroj - ruĝa, oranĝa, flava kaj verda - por li ĉiuj estas de sola

koloro-li nur vidas flavan nuancon

Siaj ĝustaj vortoj estis: Unu makulo el ordinara inko, farita sur blanka papero, havas por mi la saman koloron kiu havas sanan personon. La sango similigas la malluman verdan el la boteloj. Tio-ĉi nomiĝas "daltonismo"

kaj ĝi estas malsameco de la vidsenso kiu konfuzas la kolorojn. Por helpi al la personoj kiuj suferas ĉi-tia anomaliao en kelkaj landoj la semaforoj havas cirklan la ruĝan lumon kaj kvadratan la verdan lumon. Mi rememorigis vidi tiujn signalojn en Zuriĥ.



Daisi MURILLO
(Lernantino)



HIMERO

Mi volas, nudanime, ĉiutage
flugi iomete sur “Clavileño” (*)
kaj involvi en iluzion la fantazion
per la bluaj festovestoj de la songo.



Esti akvo, vento, nuboj...kiel ĉielo
tutplenigi min de steletoj el oro
kaj ke la freneza birdo de mia deziro
alportu al mi ĉiutage sian trezoron.



Fuĝi, flugi al la kulmino, avara
de vero kaj forgeso, kun vizaĝo al la Suno,
kaj en floko de ŝaŭmo fariĝi klara
kaprico de iu vivanta sunfloro.

Verkis: *Luis Menéndez LUMEN.* -

Esperantigis: *M^{re} Luisa Menéndez.* -

(*) Clavileño (pr. Klavilenjo) Estas ligna ĉevalo kiu vojaĝas tra la areo plej rapide,
en aventuro el “La inĝenia hidalgo Don Quijote de la Mancha”

LA SUMICIO

La Sumicio estas supozita astura mito.

Oni traktas de hejmeca koboldo, sperta ŝtelisteto, ĉar nenio saviĝas de siaj ungoj. Kiam vi perdas ion, kiu pro ĝia volumenaĵo aŭ pro la zorgo, kun kiu oni gardas ĝin, ŝajnas neeble ke ĝi povas perdiĝi, do oni diras ke, la Sumicio kunportis ĝin. Sia nomo, montras sian profesion; li havas sian originon en "sumere"-latina vorto, kiu signifas, preni, akiri, alpropiĝi,-kaj estas tio kion faras la koboldo.



Unue plaĉas al li malaperigi tion aĵon kiun vi ĵus havis antaŭ viaj okuloj, tio kion en tiu momento vi lasis sur tablon kaj ke pro ensorĉo, ĝi ŝajnas diluiĝi en la aero. Ĉar la Sumicio estas nevidebla kaj li eniras kaj eliras tra ĉiuj lokoj, neniu vidis lin neniam, nur oni konas lin pro siaj heroaĵoj.

Ludoviko

Lernanto



BEZONO DE LA INTERNACIA LINGVO TRA LA HISTORIO

(Fino)

VI

Sed, je 1887, en Polando, aperis la voĉon de L. L. Zamenhof, kiu malfermis la mondajn okulojn, asertante ke: "Por ke lingvo estu monda, ne sufiĉas nomi ĝin tiel".

Jes, adopti nacian lingvon, eĉ du lingvoj, same kiel iuj proponis, estis nepensebla. La historio de la lastaj jarcentoj montris lin ke la grandaj potencoj ne estis preta por transdoni la poziciojn kiujn ili konkeris por iliaj lingvoj. La malgrandaj nacioj, kaj la etniaj minoritatoj, ofte viktimoj de la kultura rasekstermo, komencis aŭdigi siajn voĉojn, ĉiufoje pli forte, defendante iliajn naciajn legitimecojn.

Do, nur restis, kiel la sola logika solvo, la adopto de neŭtrala internacia lingvo por ĉiuj la internaciaj rilatoj, tiel kiel Descartes, Leibnitz, Komensky kaj aliaj persistoj iam revis. Kaj, inter numeraj projektoj, nur la Internacia Lingvo, komencita de la Dro. L. L. Zamenhof je 1887, kaj poste konata per la nomo de Esperanto, adoptante la pseŭdonimon de ĝia aŭtoro mem, devenis lingvon de aktiva internacia kolektiveco.

La Ĉinia, Araba, Greka, Roma, Franca, Angla kaj Germana popoloj, ĉiu je sia momento, atingis siajn celojn tra la historio, apogitaj de la povo de siaj respektivaj imperioj. Nun la Hispan-parolantaj landoj povus havi la samajn pretendojn koncerne al nia lingvo.

Post la Internacia Lingvo ne elstaras la povo de nenia ŝtato, sed, ĝi mem posedas la forton de la internacieco kaj, ekde la nura lingvistika vidpunkto, la plej grandan perfektan, ĉar ĝiaj gramatikaj kaj fonetikaj reguloj ne havas esceptojn. Do, L.N. Tolstoj asertis en letero, la 27^a de Aprilo de 1894: "La facileco de ĝia lernado estas tia, ke ricevinte post ses jaroj gramatikon de Esperanto, vortaron kaj kelkajn artikolojn, skribitajn en tia lingvo, kaj post studi ĝin dum ne pli ol du horoj tage, mi povis, ne skribi sed legi tre facile tian lingvon." Eĉ kvardek membroj de la Franca "Académie des Sciences", en rezolucio je la 1^a de Junio de 1924, nomis la Internacian Lingvon Esperanton kiel "ĉefverko de logiko kaj facileco".

Post ĝi, elstaras la povo de la racio, de la justeco, de la sameco de la tutaj lingvoj, kaj, rezulte, de la frateco, kio estas la plej necesa nuntempe. Estonteco montros al ni ĉu la racio venkos la antaŭjuĝojn kaj la superstiĉojn de la lingvoj en la internaciaj rilatoj.¹

Maria José Álvarez Faedo

¹ Parolado prononcita okaze de la deka datreveno de la naskiĝo de la Avilesa Esperanta Asocio ANTAŬEN kaj kiel omaĝo por la Doktoro Zamenhof, en la kunveno de la Kultura Domo de Avilés, la 17^a Decembro, 1995.



LAŬDO PRI LA FRENEZO

Mi flugis sur la neston de la kukolo, ĉi tie, en la aĉastrato, kie iu ajn povas esti akusita de frenezulo. Se vi ne havas sufiĉajn atributojn pri egoismo, racio kaj avareco, ili povas malliberigi vin por ĉiam, en la nomo de la absoluta vero, la establordo kaj la ekzaktaj sciencoj. Stultegaj ĝendarmos. Ili pensas ke la ĥaoson oni povas kontroli. Ĉu okaze povas iu malebligi la formadon de galaksio, la malvarmiĝon de stelo, la erupcion de amo...?

Mi flugis sur la neston de la kukolo. Ĉi tie, en la aĉastrato, mi vidis kunligindajn malfrenezulojn marŝi al luksegaj oficejoj kie ili desegnas planojn pri homa masakrado. Pura milito. Jam oni ne mortigas soldatojn. Jam ne suferas kaŝita timemulo en la tranĉeo, kokuranto por frenezulo, psikiatrebla karno. Nevideblaj aviadiloj pentras el griza la ĉielon kun sona rapideco disŝutante mortigajn ekskrementojn kun terura teknikprecizeco. Tion oni pagas per impostoj de tiuj kiuj abomenas militon en propra hejmo. Ni estas alvenante al plafono de la granda puto el ekskrementojn kiujn ni konstruas scioplene sur niaj kapoj. Damokles estis senscia kun la spado. Ni ja estas lertaj.

Mi flugis sur la neston de la kukolo kaj mi vidas la ordinaran popolamason fuĝi terurplena de si mem serĉante ion por loki en sia altaro. Adoreguloj de la kruda materialo, la siliciaj labirintoj kaj la netolerebla disvolvo de la bursa komercaĵo, la loĝantoj de la suburboj de la globusa vilaĝo ploras kaj ridas pasie dum ili avidmanĝas kolombetojn el maizo en komodaj foteloj ritme kun la sono de la kugloj en la granda projekciekrano, protekta, netrancia, la malamiko ne povas detekti nian ĉeeston en la komforta klimatizita ĉambro, kun cinemaskopo kaj sensurronda sono, vivu ĝin kiel la mem milito, sentu kiel eksplodas la bomboj apud vi sur la luksa firmlanko, vi povas surpaŝi ĝin trankvila, ne atingas ĉi tien la metrajlo, tio estas en alia milito de ia subvilaĝo, funkcias la biletoj kaj la profito de la akcioj taŭgas por pagi la bombojn, la fikcibombojn kaj la bombojn el kruda realeco kiujn aliaj homoj mortigas malantaŭ la projekciekrano.

Mi flugis sur la neston de la kukolo. Ekde la pli absoluta malriĉeco, kiel diris Groucho, ni daŭrigas suprenirante ĝis la pli altaj kvotoj el la mizero, gvidataj nin per rabema racionalo kiu pravigas iun ajn sistemon utiligita por nura celo kiun ni nomigas progreson, disvolvon, civilizecon. La paco pravigas la militon estas la pli absurda paradokso proklamita de la homara cinikeco ekde ni estas ĉi tie, ekde ni ŝpuras nian vunditan Teron, disrabita pro nomo de tiu sama celo de kiu la scienco, la pura racio, estas instrumento kaj orakolo samtempe. Ne ekzistas eskapo por ni. Tenacaj vigluloj de la planedordo, la mondĝendarmoj patrolas sen ripozo la stratojn de la globusa vilaĝo ĝis ĝiaj lastaj kaŝejoj estingante la pli minimuma ekintenco el frenezo. Nur brulas sian fajron, escepte la propra ĥaoso, kiu finos forstrekigas ilin de la vizaĝtero.

Damego.-

MESAĜOJ

La gelernantoj apartenantaj al la avilesa-esperanta grupo, plibonigas. Ĉijare jam tri partoprenas en la eldonaĵo de nia modesta revuo. Kia feliĉeco!

* * * * *

En Bouresse-Francio- la fama "Kvinpetalo" de Esperanto-Centro, laboras kaj laboras.

Laŭ la programo sendita per nia tre bona literamikino Ginette Gabillon ni legis la jenajn aktivecojn por la nuna monato julio:

5^a-10^a Progresiga kurso per la libro:

"La maŝino kiu krias".- Gvidas: Paul Gubbins

Samtempe: Iniciado kaj praktikado de jogo:

Gvidas: Arlette Plutniak.

Precizigota dato:

La hispana poezio. Gvidas: Miguel Fernández

* * * * *

Ĉiuj la membroj de nia grupo gratulas, plezure, al samideano kaj amiko Eduardo Vargas- SOLO.-. Li denove gajnis konkurson pri elektroniko kaj muziko. La revuo, kiu patronas tiu-ĉi evento, estas la titolita "Future-Music".

LA BONA FRATINETO

Saŝko ege ŝatas ludi. Tio estas tiel gaje!. Sed la patrino ne estas kontenta. Denove Saŝko forgesos la gramatikon.

-Saŝko, venu ĉi tien! -vokas ŝi lin.

Li venas.

Nun ni ekzamenos iomete - daŭrigas la patrino. Diru unu frazon!


Mmm.Mi iros al la maro. Balbutas Saŝko.

Tiel...Kaj en kia tempo estas "mi iros"?

Julka, la fratineto de Saŝko estas proksime. Ŝi ankoraŭ ne iras al lernejo. Ŝi sentas angoron pri sia frato kaj rapidas suflori al li:

Frato, frato...somératempo!

Vera Ivanova



LA LABOREMA FORMIKO KAJ LA GREN'GRAJNETO

Estis en la fino de la somero. La formiko portis al la formikejon la lastan gren-grajneton de la kampo. Subite la grajneto ekparolis: "Kara formiko, lasu min sur la teron kaj kovru min per teraĵo. La unua aŭtuna pluvo jam malsekigis min kaj mi baldaŭ ekĝermos. Mi petas vin, semu min antaŭ via dometo kaj mi rekompencos vin.

La formiko tiel faris. En la printempo la grajneto elkreskis rapide kiel alta trunketo kaj ĝis la somero ĝi spikiĝis kaj donis al la formiko tutan plenmanon da grandgrajna greno.

De tiam la formiko ĉiam semas en la teron la lastan grajneton.

El la bulgara tradukis:

Lilija Koleva

Antaŭen konscienco de l'Homar'
La naskilo de tutmonda amika fratanar'



REGNU UNUECO EN DIVERSECO

**Universalaj naskiĝas la beboj;
ili ridetas kaj amikas al ĉiuj
sed tratempe interfremdiĝante
perdas sian universalecon.**

**Vere homeca tutmonda edukado
celas reakiri universalecon
jam tiam sur kampon konscian
de unuec' en diverseco.**

* * *

**La ununura flago de l' Homaro
estas la ĉielblua
kiu la tutan Teron brakumas
kaj donas al ni ĉiuj vivestaĵoj
la spiron de vivo
kaj nin protektas egale**

Kunlaboranto: Jesús Raposo
Valencio .- Hispanio

RAKONTETOJ PRI OVOJ

La paska ovo kaj la
ĉokolado!

Estas la unuaj kristanoj
kiuj inspirigante de la
malnovaj kredoj kaj
de aliaj kutimoj prenis
la ovon kiel
simbolon, samtempe de la
Resurekto de Kristo kaj de la
natio.



La ovo atestas kaj
promesas la resurekton, kiu ne
estas naskiĝo sed reveno. La
ovo per la kristanismo iĝas
mistika objekto. La strutovo
memoras pri la kosma ovo, ĝi
estas kreinto de ĉio.

ĈOKOLADO

En Europo, estas nur ekde de
la XII-a jarcento, ke oni kutimis
farbi la ovojn privilegiante la
ruĝon. Iom post iom nova kutimo
aperas "tiu de dekoracii la ovojn,
ne plu uniforme per vulgarej

vegetalaj tinkturoj, sed per veraj
pentraĵetoj. Ili iĝas artaĵoj!.

La kortumo de la "Sun-
Reĝo" Ludoviko la XIV-a,
celpunkto de la tuta Eŭropo,
lanĉis tiun modon. Estas tiel, ke
la ovo vidis sian aspekton ŝanĝi,
laŭ la gustoj kaj la rafinaĵo de
Versailles (Versajle). Sed estas la
kuirejoj, kie realiĝis la miraklo.
La respektigaj ĉefkuiristoj
malkovris, ke la kokino
ankoraŭ tipe konsiderita kiel tipa
paska ovo povus
esti



anstataŭigitaj per ovoj multe pli
dikaj kaj milfoje pli ĝuplenaj kaj
apetitvekaj. Do, ili imagis uzi por
la ŝelo tiun delikatan substancon
venita transe de la maroj "la
ĉokolado tiel naskis la
"ĉokoladovo"!


El malnova regiona ĵurnalo 1982

Kunlaborantino:

Odette

Scheidel.

Francio



Ĵetbuloj estas ĉasilo tipa de la pampasa regiono en Argentino. Ĝi konsistas el 3 sferoj ligitaj per ledaj plektaĵoj kaj ili estis elpensitaj de la aŭtoktonaj triboj tehuelĉa, mapuĉea kaj patagona, la iamaj enloĝantoj de Patagonio. La gaŭĉoj poste adoptis tiun ĉasilon kaj en ties uzado ili fariĝis tiom spertaj, kiom la indianoj. Ĵetbuloj tiom populariĝis en postaj periodoj, ke neniu kamparano forlasis sian domon sen porti ilin pendantaj de la zono.

En la jaro 1845 Francisco Javier MUÑÍZ priskribis ilin kiel "formitaj de 3 buloj grandaj kiel pugno, kovritaj el ledopecoj kaj kunligitaj per unumetra ledŝnuroj. Por uzi ilin oni prenas en la mano la plej malgrandan sferon (nomata "stirilo") kaj ĉirkaŭmovas ĝin super la kapo, tiel, ke la 2 aliaj pro la ĉirkaŭirado akiras grandan rapidecon kaj oni povas tiam forĵeti la tuton en la direkton de la kruroj de la ĉevaloj aŭ bovinoj". Per ĉi tiu metodo la brutoj estis kaptitaj, ĉar iliaj piedoj restis firme ligitaj per la ledaj ŝnuroj.

La buloj estis origine el ŝtono, kaj kie tiu materialo ne ekzistis, ĝi estis anstataŭita de femuraj ekstremaĵoj de bovinoj ĉirkaŭvolvita per humida ledo.

Hodiaŭ ĵetbuloj estas ankoraŭ uzataj en la kamparo, sed la plejmulto estas destinita al dekoracio kaj kolektantoj amasiĝas en la fama foiro de San Telmo en Bonaero por aĉeti la plej luksajn kun ornamaĵoj el arĝento.

Stilio Orellana Hoja
Argentino / Nederlando

Siamaj katoj.



Tiu speco de katoj estas konataj kiel elegantaj, inteligentaj, longaj, viglaj kaj parolemaj. Jen iom de niaj membroj pri siamaj katoj:

Bob Felby, Aŭstralio rakontis ke li post la morto de la nigra Oskaro ricevis purrasan siaman katinon. Ĝia nomo estis Kleopatro. Sed okaze estis ino Bob opiniis ke Kleopatro ne taŭgas sed nun ŝi nomiĝas Kleopano kaj estas tre ŝatinda katino.

Bob plue rakontas:



Jen humoraĵo pri la siama kato, "Blue"

"Blue", kvarjara siama kato, senĉese amuzas

siajn homojn. Ili havas ĝin ekde ĝi estis nur 18 monata. Iam ĝi hejmentrenis unu kilogramon da katmanĝaĵo. Ĉar la familio ne loĝas proksime al superbazaro estis eĉ pli granda surprizo, kiam la kato hejmentrenis identan pakon unu semajnon pli malfrue.


"Blue" ĉiam hejmenportas ion. Iam la monujo de la filo elfalis el la aŭto sur la straton. Preskaŭ tuj la kato enportis ĝin en la domon. Nun ĝi ŝatas hejmenporti aĵojn el la aŭto de la najbaro.

Patriŝa Harkin, Aŭstralio sendis artikolon.

Varmega kato estas heroo.

Matene ĉe domfajro en Taŭnsvilo, kato helpis vivsavi virinon kiam li saltis sur la liton de najbaro kaj vekis lin. La virino, kiu transloĝis en tiun domon antaŭ nur kelkaj tagoj, dormis, do ne sciis pri la fajro.

La brulalarmilo estis ŝaltita post la vekigo de la najbaro. La fajrobrigada peranto eksplikis ke eble kandelo kaŭzis la brulegon en la malnova, ligna domo. Feliĉe ke estis tie veka kato.





Amuĝaĵoj

CISIMO



Muso kun idoj frandis fromaĝon, kiu hazarde estis forgesita sur la tablo. Subite ekpiediris kato en la ĉambro. La musoj timiĝis kaj la etuloj kaŝiĝis malantaŭ la dorso de la patrino. Neatendite aŭdiĝis de la buŝo de la muso: Hau, Hau!

La kato malaperis kaj la musopatrino fieri diris:

-Estas bone koni lingvojn!

(En la finna lingvo la hundo diras hau hau)

SYLVIA HAMALAINEN

Finlando

Radio-komunikado inter usona kaj kanada aŭtoritato

-Bonvolu devojiĝi je 15 gradoj norde por eviti kolizion. Via vico.

-Prefere, vi bonvolu devojiĝi je 15 gradoj suden por eviti kolizion. Via vico.

Tie ĉi Kapitano de ŝipo de la usona militŝipo. Mi ripetas: Vian vojplanon bonvolu modifi. Via vico.

Ne. Vi bonvolu devojiĝi, mi petas. Via vico.

-Ĉi tie aviadilŝipo Lincoln de Usona Ŝiparo, la dua laŭ graveco de la militŝiparo de la Ŭnuiĝintaj Ŝtatoj de Ameriko. Mi petas, ke vi devojiĝu vian vojplanon je 15 gradoj norden, se ne, trudaj aranĝoj estos decidatan por certigi la sekurecon de nia ŝipo. Via vico

-Ĉi tie, lunturo. Via vico

(verebla historio)

JEAN DOUBLET

Francio

Auto rapidegas tra vilaĝo.
Policisto finfine haltigas ĝin:
-Sinjoro! Ĉu vi ne legis la tabulon pri la permesita rapideco?
-Ĉu legi? Dum tia rapideco?!

SANTIAGO MULLAS

Hispanio

Parolas amikinoj
-Mia edzo anĝelo estas!
-La mia ankoraŭ estas viro

IVAN VARJUHIN

RUSIO

Edzo (antaŭ kaĝo da simioj)

-Parencoj viaj ĉu ne?

Edzino (dolĉe)

-Jes, boparencoj

PATRICIA HARKIN

Australio

PETAĴO

Mi petas humorajn el diversaj landoj por publikigi en ĉi tiu revueto. (mi antaŭdankas)
Sendu al:

CISIMO R. SIMON
c/ La magdalena nº 26 - 1º D
C.P.33400 - AVILES
ASTURIAS - ESPAÑA

"SEPA INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO DE LA KULTURO KAJ TURISMO"

(sub la aŭspicioj de Hispana Esperanto-Muzeo)

Aliĝkondiĉoj

Restado kun kompleta pensio en hotelo "CAMBRILS PLAYA ****"
Aliĝo al la "semajno" 3.500 pesetoj, post la 31 de julio 4.000 ptoj.
Gejunuloj ĝis 20 jaroj senpage.
Ĉambro dulita. 4.400 pesetoj, po persono kaj tago.
Ĉambro unulita. 5.300 pesetoj.

Mi sendas kiel aliĝon..... pesetojn, por restado en hotelo dum..... tagoj pesetojn,
entute.....pesetojn, aŭ kiel anticipon.....pesetojn

Nomo kaj familia nomoj _____ Tel.....

Kompleta adreso _____

Volu pagi al jena konto: "Caixa de Pensions" N° 2100 3028 20 2200302850

Au per poŝta ĝiro al "Internacia Esperanto-Semajno" Font Nova 32. 08202 SABADELL

"SEPA ESPERANTO-SEMAJNO, DE LA KULTURO KAJ TURISMO"

(sub la aŭspicioj de Hispana Esperanto-Muzeo)

Okazonta en CAMBRILS (Tarragona) Katalunujo-Hispanujo
DE LA 2 ĜIS AL 9 DE OKTOBRO 1999

Nia "Semajnejo" estos la hotelo. "CAMBRILS PLAYA ****" Avda. Diputació, 99-101 43850
CAMBRILS (Tarragona) Katalunujo-Hispanujo. En la hotelo, kiu troviĝas 50 metrojn fronte de la
strando, estas ĉiuj modernaj komfortaĵoj; telefono, banĉambro ampleksaj terasoj, amuzejoj,
trinkejo, banejo, salono kun televido, parkumejo, ĝardenoj.

Pliajn informojn vi povas peti al: H.F.E.A Apartado 15027 08080 BARCELONA (Hispanujo)
Tel.937253421 kaj 937275021 Faksilo 937836511. Retadreso: luis_serrano@mixmail.com

Kara samidean-ino, se vi emas prelegi, vi havas eblecon ĝin realigi en nia "Semajno" sed nepre
informu nin sufiĉe frue, por ke ni povu enprogramigi vian prelegon. Estas ideala loko kaj momento
por sciigi al esperantistaro viajn ideojn kaj pensojn. Etoso Esperantuja!

Mi deziras prelegi pri la temo.